## PROGRAMO DE LA VENONTAJ SEMAJNOJ

Januaro 2008
9 Revid-kunveno.
16 Kion vi atendas de nia bulteno?
23 Lingva vespero – preparu viajn demandojn!
30 Paulo Branco pri Esperantaj aranĵoj: (Malborka Ago-Semajno, Kijiva Semajno, Velura Sezono, Aroma Jalto, BET Shiauliai, Hispana Kongreso de Palos).


Februaro 2008
6 Diskuto pri Karnavalo (*Karnavalo marde 5/2*).
13 Vi mem proponu temon.
20 Hélène Falk organizos kvizon.
27 Pri la Lovena lingvo-festivalo.

Marto 2008
5 José Pinto de Sousa, denove pri la landnomoj.
12 Sentema kunveno. Vi proponu temon.
19 Antaŭ Paska kunveno (*Pasko katolika dimanĉe 23/3*).
26 Ne okazos kunveno pro Paskaj ferioj.

## KOTIZ-TABELO 2008

| Nro | Kodo | Kategorio | Kotizo (EUR) | Rajtoj |
|---|---|---|---|---|
| | | ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO | | |
| 11 | MEM | Membro de EBG | 10 | |
| 12 | MEM-R | Membro - junulo (ĝis 26-jara) | 5 | abono al "Aktuala" (organo de EBG) + partopreno en la vivon de la Grupo |
| 13 | MEM-S | Membro - pensiulo, senlaborul | 7 | |
| 14 | FAK | Familia kunloĝanto | 2 | partopreno en la vivon de la Grupo |
| 18 | DVM | Dumviva membro de EBG | 250 | Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo |
| | | BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ | | |
| 21 | APE | Membro de "Association pour l'espéranto" (valona) | 14 | Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva) |
| 22 | FEL | Membro de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) | 25 | Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva) |
| | | UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO | | |
| 31 | SA | Simpla abonanto de "Esperanto" | 37 | Abono al "Esperanto", monata organo de UEA |
| 32 | Kto | Simpla abonanto de "Kontakto" | 23 | Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA |
| 33 | MJ | Membro de UEA kun "Jarlibro" | 23 | Membreco en UEA + "Jarlibro" |
| 34 | MA | Membro-abonanto de UEA | 58 | MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato ! |
| 35 | MG | Membro de UEA kun "Gvidlibro" | 9 | Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj) |
| 36 | SZ | Membro de Societo Zamenhof | 116 | Membreco en Societo Zamenhof (honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEAn) |
| 37 | MD | Dumviva Membro de UEA | 1450 | MA de UEA dum la tuta vivo! |

Expéditeur: Paulo Branco, 29 Froissartstrato 1040 Etterbeek, Belgio



# ESPERANTO aktuala

INFORMILO DUMONATA de la ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO
Januaro - Februaro 2008 *Nova Serio* N°1

Redaktoro Honora: Hélène Falk-Bracke, Eikenlaan,7-B-1640St.Gen Rode; Redaktoro: Paulo Branco; Prezidanto: Angelos Tsirimokos,405 av.Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Glady, cglady@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare,konto EBG 000-0123048-52; Sekretario: Hélène Falk-Bracke informas+3223584214,helene.falk@skynet.be; Kunvenloko rue Van Maerlantstraat 2 ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAELBEEK (*tie nek poŝtkesto nek telefono*); Informoj: http://users.belgacom.net/EBG http://ebg.skynetblogs.be http://uea.org www.esperanto.be www.esperanto.net www.omniglot.com/writing/esperanto.htm

## ENHAVO

**Paĝo 2 - Zamenhof-festo de la Esperantista Brusela Grupo**
**Paĝo 3 - Ankoraŭ pri la 100-jariĝo de Esperantista Brusela Grupo**
**Paĝo 4 - Kie esperantumi baldaŭ**
**Paĝo 5 - Daŭrigo de "kie esperantumi baldaŭ"**
**Paĝo 6 - Skeĉo de la teatraĵo prezentita dum la Zamenhof-festo**
**Paĝo 7 - Diversaj novaĵoj**
**Paĝo 8 - Programo de semajnaj kunvenoj kaj kotiz-tabelo**

# Zamenhof-festo de la Esperantista Brusela Grupo



Foto 1: Françoise Pellegrin kaj Nelly Bracke. Foto 2: Clara Bracke. Foto 3: Hélène Falk-Bracke kaj José Pinto de Sousa

**VIVU NEDERLANDO ! estis la ĉijara temo  ĉar  en 2008 Universala Kongreso okazos en ROTTERDAMO de la 19-a ĝis la 26-a Julio.**

***Kiam je 9h30, kun Françoise, mi alvenis en" De Zeyp", mi preskaù panikis vidante salonon tute ne meblitan. Sed alvenis multaj helpemaj koboldoj kiuj , kvazaù en baleto, ordigis la tuton, La « ĉerizo sur la kuko «  estis la 20 bukedoj da oranĝaj tulipoj kunportitaj de*** *Dina -Dankon*. ***la tutaĵo eĉ ne daŭris unu horo !*** *Gratulon al ĉiuj*. ***La*** *oranĝa koloro* ***tuj gajigis la etoson ! Malgraŭ la fervoja striko, la  gastoj alvenis tiel nombraj ke la salono tute pleniĝis. Ĉiuj babilis, trinkante aperitivon kaj serĉis seĝon ĉe amiko por kune manĝi.***

***La distra parto komenciĝis pere de skeĉoj luditaj de niaj lernantoj :ĉifoje, temis pri problemoj inter nederlanda familio kaj  alinacianoj ĉe fora landlimo (la teksto aperos en iu AKTUALA).*** *Dankon al ĉiuj .*

***Sekvis muzikaĵo " INTROSPECTION" de Rogier Van Otterloo ,ludita de la familio Van Damme; Emile kaj lia nevino : : flutistoj, Philippe : piano.*** *Gratulon kaj dankon al ĉiuj*.

***Poste venis nia  'horo. Temis pri nederlandaj famaj kantoj kiel "PIET HEIN" (L'arĝenta floto) aù "DAARBIJ DIE MOLEN" (ĉe la muelil' ) TULPEN UIT ROTTERDAM" (Tulipoj el Rotterdamo) .  Ĉar la paroloj enskribiĝis sur ega ekrano,ĉîuj kiuj konis la melodion povis kunkanti. Nelly, kiu instruis la kantojn dum 3 semajnoj,povis ankaŭ kuraĝigi la malaŭdaculojn per sia ampleksa  voĉo ampleksigita ankoraŭ per mikroo***. *Dankon, Nelly*

***Marc Demonty  parolis pri la multaj kaj danĝeraj inundoj kontraŭ kiuj la Nederlandoj  batalas de pli ol mil jaroj. La konstruado de la  DELTA-PLANO en 1953 protektas nun tutan regionon***

***Sekvis la folklora grupo «*** *DE HAKKESPITS* ***»(la pinto de la kalkano) el Venray, urbeto de la nederlanda*** *Limburgo* ***(inter Venlo kaj Nijmegen).Temas pri 20-kapa ensemblo : tri akordeonistoj kaj unu flutistino, dancistoj kaj kantistoj. Ili volas konservi la memoron de la tradiciaj festoj ,kaj de la tradiciaj vestoj kiujn ne postvivis la komencon de la 20-a jarcento. En sia repertuaro, pluraj melodioj estis konataj de ni, kaj multe kunkantis, nederlande aù esperante. De Hakkespits-er ankaù detalis la diversajn partojn de siaj vestaĵoj;  kufoj kaj jupoj vekis specialan intereson, sed la ĉefa intereso estis ke laù la kostumo, oni povis dedukti ne nur la riĉecon sed ankaù la socian klason, ĉu virino estis edziĝita aù ne. ktp.Tion, oni retrovis ĉie en Eùropo kaj en aliaj kulturoj. La dancoj, laù la nomoj « valso ,mazurko, polko»  ankaù diras sian elirregionon, sed kiel tradukaĵoj, ili perdas iom de sia modelo je ĉiu traduko. Tamen, ili restas atestantoj de intereŭropaj ligoj   tujan tradukon faris*** *José –dankon.*

*Dankon Nelly, Françoise kaj Klara* ***Triope, ili preparis la manĝaĵojn, la trinjaĵojn kaj la regis la intendantecon  de A ĝis Z . Se la sukceso de la Z.F. estis tiel gaja kaj sukcesa , estas danke al ili. Mi aldonas ke la verdaj koboldoj denove aperis kaj ke ni finfine reiris hejmen je la 6-a  - salono tute ne meblita.***

***Ankaù pli ol la  perfekta  organizo de la festo, radiis el tiu aranĝo, sento de harmonia konsento kaj kunsento de nia EBG.***

***Venontjare al Bjalistoko ?***

***Hélène Falk***




*Foto1: Festejo. Foto 2: De Hakkespits. Foto 3:* Angelos TSIRIMOKOS, Françoise PELLEGRIN, Paulo BRANCO,  Francine SPERBER, Clara BRACKE, Simon TITE, Claude GLADY, Henri DEPREZ.



# Malfermaj Pordoj en la Centra Oficejo de UEA

Kutime okazas Tago de Malfermaj Pordoj en la Centra Oficejo de UEA  en Roterdamo dum la lasta Sabato de Majo kaj Novembro. Kiel ofte, diversaj membroj de nia grupo partoprenis dum la 24_a de Novembro 2007.



(En la foto Osmo Buller, direktoro de la Centra oficejo, prenas la parolvicon, kun kvar membroj el la sep de la estraro, de desktre maldesktren:
*Ranieri Clerici*, Italio:
Vicprezidanto (*eksteraj rilatoj*);
*Claude Nourmont*, Luksemburgio:
Vicprezidanto (*kulturo, edukado, kongresoj*);
*Barbara Pietrzak*, Pollando:
Ĝenerala Sekretario (*informado*);
*Loes Demmendaal*, Nederlando:
Estrarano (*financoj, administrado, TEJO*)

# Reelektita Estraro de Esperantista Brusela Grupo


Ĝenerala Jarkunveno de la 14_a de Novembro 2007 je la 19_a horo reelektis saman estraron de Esperantista Brusela Grupo  por plia jaro.
Angelos Tsirimokos estas Prezidanto,
Claude Glady estas Kasisto,
Hélène Falk-Bracke estas Sekretario.



*(Angelos Tsirimokos kaj Claude Glady en la foto)*

# Internacia Mara Esperanta Renkontiĝo 2008

**De la 29-a de majo ĝis la 1-a de junio 2008 en mara ripozloko Krajmorie, Bulgario okazos** Internacia Mara Esperanta Renkontiĝo (IMER).
**Krajmorie toviĝas nur ja 9 kilometroj de la fama havena urbo Burgas ĉe la pitoreska bordo de  Nigra Maro. Ĝi estas trankvila, kvieta ripozloko kun bela mara pejzaĝo.**
Temo**:** "Originala Esperanto-literaturo", **lekcioj, debatoj, distraj vesperoj.**
Ekskursoj: **al la antikva mara urbo Sozopol, al la fama havena urbo Burgas kaj ties historia muzeo, al urbo Pomorie kaj la fama monaĥejo "Sankta Georgo", kie antaŭ du jarcentoj okazis pluraj mirakloj. La ekskursoj estos per aŭtobuso. Unu ekskurso kostas 20 eŭrojn.**



**Esperanto-hotelo** "Diana"**:  unulita ĉambro por unu nokto – 20 eŭrojn.**
**Du-, tri- kaj kvar-lita ĉambro por unu nokto – 10 eŭrojn.**
**En la ĉambroj estas televidilo, fridujo, klimatizilo, luksa banejo.**
Aliĝkotizo: **Ĝis la 31-a de marto 2008 – 10 eŭrojn. Ĝis la 30-a de aprilo 2008 – 15 eurojn. Poste: 20 eŭrojn.**
Por pliaj informoj**:**  Julian Modest**, retadreso: modest@abv.bg**

*Kiel pagi* ***(eventualaj bankkostoj estos dekalkulitaj)***
❑ **Bankkonto de la organizanto (GEORGI MIHALKOV):**
**MUNICIPAL BANK PLC, Stamboliyski str. 143 A, Sofia-1303, BG.**
**BIC: SOMBBGSF**
IBAN**: BG 03 SOMB 9130 44 26339902**

## TEKSTO DE LA TEATRAĴO PREZENTITA DUM LA ZAMENHOF-FESTO APERIGATA EN TIU BULTENO LAŬ DEMANDO DE LA GEAKTOROJ

***Nederlandanoj sin preparas por vojaĝi al E.kongreso. Ili metas multajn aferojn en la valizon. Patro,patrino kaj filino, ĉiu venas kun aferoj……….Ili foriras. Ĉe la doganejo : nia familio kaj malantaŭ ĝi vico de atendantoj***

**La doganisto** **Ĉu vi havas ion por deklari ?**

**Patro** **Ne, estas niaj vojaĝaferoj**

**Doganisto** **Bonvolu tamen malfermi tiun dikan kofron**

***La patro malfermas la kofron sed ĝi estas tiel plena ke ĉio falas : skatoloj kun sardeloj, konservita lakto, trinkaĵoj, biero, ktp***

**Doganisto** **Kio estas tio ? Ĉu vi intencas malfermi magazenon ?**

**Patro** **Ne, tute ne, sed en Nederlando ĉio estas pli malmultekosta, kaj plie, ni ne volas iri en restoracion : ni preparos niajn manĝaĵojn mem**

**Doganisto** **Ho mi vidas : vi kunportis kuirileton kaj kaserolon**

**Patro** **Jes, kompreneble**

**Doganisto** **Kaj kio estas tio ?**

**Patro** **Estas kovrilo**

***Patrino turnas sin al la atendantoj :***

**Patrino** **Vi komprenas : ni dormos sur la strando en la pura aero ! Estas tiel romantike,ĉu ne ? Kaj tio kostas nenion.**

**Doganisto** **Sed,kion vi kaŝis en la kovrilo ? Fi,mi havas la manojn tute grasmakulitaj Fi !!!**

**Patro** **Atentu ! Estas nia butero**

**Infano** ***ploretante*** **Kion oni nun metos sur miajn buterpanojn ?**

***La doganisto purigas la manojn per rulaĵo da tualetpapero kiu ankaŭ troviĝas en la valizo (multe da papero kovras jam la plankon)***

**Doganisto** **Bonŝance vi kunprenis ĉion necesan !**

**Patrino** **Ne uzu tro !!!**

**Doganisto** **Kaj tio ?Kio estas tio ?**

***Li elprenas elektro-spiralon,poteton kaj termos-botelon.***

**Patro** **Aŭskultu: kiam ni iras en la necesejon de stacidomo por lavi nin kaj razi nin, ni ankaŭ boligas akvon, metas ĝin en termos-botelon kaj vespere, ni faras minut-supon !! Bongusta !!! Kun pano kaj fromaĝo, ni havas kompletan vespermanĝon !** ***( li montras bulon da fromaĝo)***

*La atendantoj kapjesas* **Ho, ni komprenas : vi estas nederlandanoj !**

**Patro kaj patrino (*tre fieraj)* : Jes !**

**Patrino** **Antaŭe ni vojaĝis per rul-domo, se vi komprenas !Tio estis agrabla !!! Ni iris kun geamikoj ; ili ankaŭ vojaĝis per rul-domo. Kaj ni vojaĝis kune, kelkfoje 4 aŭ 5ope unu post la alia.**

**Patro** **Kaj ni kune haltis sur parkejo kaj ni ankaŭ iris kune en tendumejon. Vespere, ni faris grandan tablon, manĝis kune, kaj trinkis kune kaj amuziĝis !! Terure !!! Kia etoso !! Kelkfoje la aliaj tendumantoj venis kvereli kun ni sed ni estis pli multnombraj kaj ĉiam venkis ! Vi komprenas :oranĝkoloro supren !! Hoj ,hoj, hoj !!!!**

**Atendanto 1** **Scheisse ! Jetz reicht's mir! Macht Mücke !! Foriru sed iomete rapide. Ni jam sufiĉe longe rigardis aktoradon ! Ni jam vidis pli amuzan filmon !**

**Doganisto** **Jes,jes ! Nun rapidu por enpaki kaj foriru**

**Atendanto 2** **Jes, ni sufiĉe longe atendadis**

***Dum la nederlandanoj penege remetas la aferojn en la valizon …..***

La aliaj **atendantoj** kune **Jes, tio estas tipe nederlanda !!!**

**Atendanto 3** **Ankaŭ ni tendumis apud tia grupo !! Ni tute ne dormis kaj niaj infanoj ploris. Finfine ni forfuĝis !**

**Atendanto 4** **Kaj mi veturis en la montaro en Francio malantaŭ karavano de nederlandanaj rul-domoj. Kiel li diris : ili ne lasis lokon inter si ĉar ili nepre volis resti kune.**

**Atendanto 2** **Kaj ili ne uzas la aŭtovojojn ĉar tio estas tro multekosta,kompreneble !!**

**Atendanto 3** **Jes,ankaŭ mi travivis tian situacion ! Mi evitas ilin kiel peston!! Min oni certe ne vidos dum la venonta Universala Kongreso en Rotterdamo ĉar mi tute ne ŝatas nederlandanojn.**

**Atendanto 5** **Hoho !! Parte vi ja pravas . Sed tio estas nur unu flanko de la medalo !!Ĉu vi konas la sloganon : « monujoj malfermitaj, digoj fermitaj » Estis en 1953 post la granda alfluo kaj la terura inundo de Zelando ! 2000 personoj dronis kaj multegaj perdis ĉion, domon kaj havaĵon SED la digojn oni fermis ! Jes vidu, kiam tio vere estas bezonata, la nederlandanoj donacas grandanime la monon kiun ili ŝparis eble per siaj supoj, sardeloj, ktp kaj sia tuta vivmaniero. Kaj per tiu mono ili faras miraklojn ! Jes,pripensu la deltaplanon kaj la « afsluitdijk…moerdijk. » Ili ĉiam batalis kontraŭ la akvon kaj venkis ĝin. Ili estas ja,foje avaraj sed ne ĉiuj, kredu min ! Kaj multaj estas afablaj,ĝentilaj,simpatiaj kaj humorplenaj personoj ! Oni povas diri ke nederlandanoj estas kuraĝa,inventema kaj inteligenta popolo.**


**Atendanto 3** **Vi pravas ! Ni ne rajtas meti ĉiujn nederlandanoj en la saman sakon. Vi konvinkis min : mi iros al la UK en Roterdamo .**

***Ŝi rigardas la ĉeestantojn*** **Kaj vi ? (*Ĉiuj samtempe) :*** **Kaj vi ? Kaj vi ? Kaj vi ?** ***Ĉiuj kantas « Venu fidelaj, venu al kongreso… »***

*(Verkis Nelly Bracke)*



## ANKORAU IOM PRI LA 100-JARIĜO



Ĵus finiĝis la jaro 2007 kaj do la 100-jara jubileo por la Esperantista Brusela Grupo, same kiel por la Antverpena kaj la Verviersa Grupoj en Belgio.
Estis escepta okazo por rememori belajn kaj pli malfeliĉajn periodojn, vidi la vojon trairitan kaj ree pensi pri niaj celoj.
Por ilustri ankorfoje tiun valoran historion ni publikigas ĉi-tie la mesaĝojn de la tri lastaj prezidintoj de EBG, inter kiuj du loĝas nun eksterlande, G. C. Fighiera en sia hejmlando Italio, kaj F. Meijer en Kanado, kie li establiĝis en 1980.
La agado dum la longa prezidanteco de S-ro Jacobs estas longe priskribita en la broŝuro ĵus aperinta pri la 50 lastaj jaroj.
La ampleksa mesaĝo de E. Van Damme tauge kaj humure konkludas – provizore – tiun retrorigardon al nia pasinteco.
Tiu-ĉi modesta publikigo estu sincera dankesprimo al la prezidintoj kaj al ĉiuj kunlaborintoj, estraranoj au ne, dum la pasinta jarcento de EBG.

**Marc Demonty**

Mi havis la bonŝancon dufoje vivi en Bruselo kaj tie labori en la kadro de la Brusela Movado. La unua fojo okazis en 1959 kiam mi restadis en la Belga ĉefurbo dum tuta jaro kiel KKS por helpi la Lokan Kongresan Komitaton en la organizo de la 45-a Universala Kongreso. Samjare mi edziĝis en la urbodomo de la Grand-Place kun Ada, kiu tiucele venis el Pollando.
Du jarojn poste, en 1961, mi revenis al Bruselo kaj tie instaliĝis – danke al Jaumotte el Antverpeno – dum 17 jaroj kiel dungito de la Universala Federacio de la Asocioj de Vojaĝagentejoj. Multaj esperantistaj eventoj okazis tiam: i.a. Bruselo gastiĝis la postkongreson de la UK en Roterdamo kaj la Brusela grupo ĝemeliĝis kun tiu de Eindhoven en Nederlando, kursoj okazis en diversaj ateneoj. Ada redaktis kaj aperigis sinsekve 272 numerojn de la gazeto "Heroldo de esperanto", kiu en tiuj jaroj estis fidela al sia tradicio de sendependa organo de la Esperanto Movado. En la dirita periodo mi unue oficis kiel vic-prezidanto kaj poste anstatauis René Jacobs kiel prezidanto de la Brusela Grupo.
Kun granda nostalgio mi daure memoras tiujn jarojn. Dankemo al la lokaj esperantistoj daure animas min, ĉar en Bruselo Ada kaj mi neniam sentis nin fremduloj: ni estis akceptitaj frate de la tiamaj esperantistoj, kun kiuj ni kunvenis ĉiusemajne, kaj kun kiuj ni ĝuis tre ofte familiajn renkontiĝojn. La Brusela Grupo tiam havis la kromtitolon "reĝa" kaj bone harmoniis kun la laborista grupo de Van Aelst.
Kortuŝe mi memoras plurajn samideanojn: Kempeneers, Jacobs, Castel, Samyn, Staes, Oleffe, Obozinski, Opsomer, Jirusek, Van der Stempel, kanonikon Gillet, Dumoulin, Jekov, Ernst, Demonty kaj multajn alijan.
Restas en mi la sento, ke mi havas grandan ŝuldon al Belgio, al la urbo Bruselo, al la Brusela Grupo kaj al ĉiuj lokaj esperantistoj. La jubileo de la Brusela Grupo donas al mi la okazon esprimi mian dankemon kaj deziri al la Brusela Movado brilan kaj aktivan estonton.

**Gian Carlo Fighiera**

Mi eklernis esperanton legante libreton "Marabout Flaŝ" dum la universitataj ekzamenoj en la somero de 1975. La unua prelego kiun mi ĉeestis okazis en ejo de la centra stacidomo kaj temis pri "Psikaj malsanulejoj por hundoj" kaj kun ĝojo mi konstatis ke mi komprenis preskau ĉion. Poste mi iĝis sekretario de la grupo kaj poste prezidanto dum unu au du jaroj. Tiutempe ni kunvenadis en la Gretry strato kaj lau mia memoro ni ĉiusemajne havis interesajn prelegojn. Mia edzino Joëlle tajpis "Esperanto Aktuala" per tajp-maŝino, ĉar ne ekzistís komputoroj tiutempe. En 1980, ni forlasis la grupon ĉar ni transloĝiĝis al Kanado.

Tutkore mi gratulas la membrojn de la Esperantista Brusela Grupo pro ĝia centjara ekzisto! Mi estas certa ke kelkfoje vi trairis malfacilajn jarojn, sed entuziasmo kaj sindonemo ĉiam venkas finfine. Mi havas bonajn rememorojn pri miaj esperantistaj jaroj en Bruselo. Pro ĝia situo kaj ĝia rolo en Europo, Bruselo bezonis (kaj bezonas) esperanton eble pli ol iu ajn loko en la mondo. Niaj kunvenoj vere kunigis geparolantojn de multaj lingvoj kiuj uzis esperanton por interkomuniki, kiel tion antauvidis doktoro Zamenhof. Leginte la nomojn de la nunaj estraranoj, mi pensas, ke tio estas ankorau vera hodiau.
Bedaurinde mi estas tro malproksima por partopreni en via jubilea festado, sed mi ĝojas legi pri la aktivecoj de la Brusela Grupo en la reto. Samideanajn salutojn al ĉiuj.

**Frank Meijer**

*Emile van Damme eventuale kontribuos kun artikolo en venonta numero de tiu Bulteno.*

# KIE ESPERANTUMI BALDAŬ

**27. decembro - 2. januaro**
**Ago-Semajno en Malbork, Pollando. Inf: viavento@poczta.onet.pl**
27. decembro - 3. januaro
24-a IF - Internacia Festivalo en Düsseldorf, Germanio. Kadra temo: "Vojaĝoj al konataj kaj malpli konataj celoj". Tuttaga ekskurso al Rejnvalo/Lorelej. Plilongiga ebleco ĝis 5-a de januaro. Inf: Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, 34303 Niedenstein, Germanio. Tel./fakso +49-5624-8007, portebla +49-171-4964558, Rete: IF/Platz
27. decembro - 3. januaro
6-a NR - Novjara Renkontiĝo en Föckinghausen apud Meschede, Germanio. Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. rete: somere5@esperantoland.org, tel.: +49-30-685 58 31 aŭ nr6@esperantoland.org
27. decembro - 3. januaro
51-a Internacia Seminario (IS) en Würzburg, Germanio. Aliĝilo
28 - 30. decembro
26-a Komuna Seminario, KS inter ĉinaj, japanaj kaj koreaj junuloj. Inf.: SONG Ho-young (Gloro), Prez. de LKK, gloro@saluton.net

## --- 2008 ---

3 - 6. januaro
PostNR - PostNovjara Renkontiĝo NULIGITA! en Föckinghausen apud Meschede, Germanio. Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. rete: somere5@esperantoland.org, tel.: +49-30-685 58 31 aŭ nr6@esperantoland.org
14 - 23. januaro
Oceania Kongreso de Esperanto en Auklando, Nov-Zelando, kunlabore de AEA (Aŭstralio) kaj NZEA (Nov-Zelando) en konferencejo St Francis Retreat Centre , en Hillsborough , Auckland NZ. Inf: P.O. Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, Nov-Zealando. Rete: nzea@esperanto.org.nz
18 - 20. januaro
Ni Festivalu, Barlastono. Inf.: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire,DT12 9DE, Britio. Tel.: +44-(0)1782-372141, rete: eab@esperanto-gb.org

---

iam en februaro
Neĝa semajno. Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. rete: neghe@esperantoland.org, tel.: +49-30-685 58 31
1 - 3. februaro
36-a Studsesio por klerigado (faka klerigseminario) en ICH/Herzberg. Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de
2 - 8. februaro
Interlingvistika studoj ĉe la Universitato Adam Michkiewicz, Poznań. Inf: D-rino Ilona Koutny, Universitato Adam Miczkiewicz, al. Niepodleglosci 4, PL-61-871 Poznań, Pollando.
8 - 10. februaro
Esperanto lingvokursoj por komencantoj ĝis parolantoj en ICH/Herzberg. Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de
**11 - 15. februaro**
**5-a Azia Kongreso de Esperanto en Bengaluro, Barato. Inf. Kongresa kunordiganto: d-ro P. V. Ranganayakulu, tel.: +91-94409 43542, rete: ranganayakulu@gmail.com**
11 - 15. februaro
Plilongigebleco (kun vintrosport- kaj ekskurseblecoj, vizitoj de muzeoj, naĝejoj, saŭnejoj, uzebleco de la biblioteko kaj vidbendservo en ICH/Hherzberg. Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de
21. februaro
Internacia Tago de la Gepatra Lingvo de Unesco
**23. februaro**
**Talen Festival Leuven Lingva Festivalo en Leuven, Belgio. Inf: info@talenfestival.ve**



---

1. marto
Balail-ĵetado de la Esperanto-Grupo Subvisurgo; loko: Nordenham, Germanujo. Kio estas "balail-ĵetado"? Jen raporto kun bildoj pri antaua balail-jhetado
1 - 8. marto
Mediteranea Esperanto-Semajno. Inf.: Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, FR-83700 Saint-Raphael, Francio aŭ Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue de Progrès FR-83600 Fréjus, Francio. Tel.: +33(0)494 95 66 18, ++33(0)494 83 06 88, rete: prezmoni@hotmail.com
19 - 25 marto
32-a IJF (Internacia Junulara Festivalo) en Senigallia, centra Italio. La temo estas "2008 internacia jaro de la lingvoj: defioj kaj perspektivoj". Inf.: Nicola Ruggiero
21 - 28. marto
Printempa Semajno Internacia (PSI) en Waldfischbach-Burgalben, Palatinato (Germanio). Inf.: Jörg Gersonde, Hermann-Wäschke-Str. 31. DE-06366 Köthen, Germanio. Tel.: +49-(0)3496-558517, fakso: +49(0)12125-27149641. psi@esperanto.de
28. marto - 5. aprilo
Nacia Kongreso de la Francaj Fervojistoj (FFEA) en Aspet (31160) apud Tuluzo. Inf.: rete: andmir@wanadoo.fr

---

4 - 6. aprilo
37-a Studsesio por klerigado (faka klerigseminario) che ICH/Herzberg. Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de
14 - 18. aprilo
Plilongigebleco (kun ekskurseblecoj, vizitoj de muzeoj, naĝejoj, saŭnejoj, uzebleco de la biblioteko kaj vidbendservo en ICH/Herzberg. Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de
19 - 26. aprilo
3-a FRINGOJ - Festa Renkonto Internacia de Geknaboj por geknaboj 7-17-jaraj kun siaj kursgvidantoj aŭ parencoj - en kastelo Grezijono. Inf.: Elizabet Barbay, 25 allée Gabriel Fauré, FR-93140 Bondy, Francio. Tel. +33-1-48-47-23-87. Rete: eliz.barbay@wanadoo.fr

---

1 - 5. majo
9-a Meksika Esperanto-Kongreso en urbo Aguascalientes. Inf: Meksika Esperanto-Instituto, Vicente Valdes Bejarano direktoro, kongreso@webmei.org, fakso: 52 449 194 4288
**1 - 11. majo**
**20-a Esperanto-festivalo "Aroma Jalto", Ukrainio. Inf.:p/k35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio. tel.h.+380-44-2851701, tel. m.+380674403172; rete: volodomir@ukr.net**
1. majo - 15 oktobro
Someraj Esperanto-Ripozoj ĉe Nigra Maro, Bulgario. Inf: Burgas, kv. Krajmorie, str. Ĉernomorka 9, Bulgario. Tel.: +359-(0)56/89-00-10, GSM 359-(0)877-46-41-88. rete: modest@abv.bg
5 - 9. majo
Interkultura Semajno kun prelegoj pri interkulturaj temoj, diskutoj, muziko en la germana (per ICH) Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de
8 - 12. majo
Komuna kongreso de francaj asocioj kun la temo "Lingvoj kaj kulturoj en Mediteraneo" en Martigues apud Marseille. Inf.: mcerisay@gmail.fr
**9 - 11. majo**
**Brita Kongreso de Esperanto en Southport, Britio. Vizitu la ĉarman britan banurbon proksiman al Liverpolo, europa kultur-urbo 2008. Inf: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, ST12 9DE, Britio: Tel: +44-(0)1782-372141 rete: eab@esperanto-gb-org**
15 - 18. majo
**Berlina Arbara Renkontiĝo, Printempa BARo 2008 en Bad Münder inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. Inf.: Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. Inf: DL8oap(ĉe)gmx.net**

*(aktualigita 13-12-2007: http://www.eventoj.hu)*